Theodor Körner,

# Je melodio

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ho, mizera koro mia!
Ĉu vi vere kredis ĝin?
Vanis la ja sopiro via
Je la dolĉa amatin'.

Ĝoje batis kun tremado
Pro la amo, mia kor'.
Detruiĝis la strebado,
Kaj la sonĝo pasis for.

*Traduko de la Germana poemo "Zu einer Melodie" de Theodor Körner en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1984.*

*MR-079-1 / Arg-755-1517 (2013-01-03 23:13:09)*